

# OOMOTO

MONATA ORGANĖ DE OOMOTO



1954 3-4

16-a Jaro N-ro (165-166) Administracio : Oomoto, Kameoka, Kioto-hu, Japanujo  
Abonprezo : ¥ 240 por unu jaro; § 0.80 aŭ 12 Steloj por eksterlando : Abonebla  
ĉe la Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

## Kiun vi elektas, vivon aŭ morton ?

### *Alvoko pro Bikini-akcidento*

La lasta hidrogen-eksplodo en la Bikini-Eniwetck Areo en Pacifiko kaŭzis en la mondo grandan sensacion pro sia terura efikeco. Kiel vi, legantoj, jam bone informiĝas pri la novaĵo, la eksperimento donis al japanaj fiŝistoj brulvundojn de radioaktivo.

Ni, japanoj, dronas en malĝojo, vidante aŭ aŭdante ke post-vivantaj atombombaj viktimoj en Hiroŝima kaj Nagasaki ankoraŭ nun sinsekve mortas multnombre anstataŭ resaniĝi. La trian fojon atakis japanojn atombombo ĉi-foje per radioaktivaj cindroj t. n. "mortigaj cindroj". Iu dirus ke la afero estas speco de incidento ; sed oni devas konsideri iom pli serioze.

Dume ni tamen certigas ke ni ne volas fari bruajn riproĉojn al iŭ aŭ alia nacio starante sur la ŝovinizmo, sed ke ni volas averti la tutan homaron pri la minacanta danĝero starante sur la alta humanismo.

La eksperimento, malgraŭ ke ĝi estis plenumita sur la ekzakta scienca plano, kaŭzis domaĝojn eĉ ekster la danĝera zono. La radioaktivaj cindroj, kiuj atakis la fiŝboaton Fukurju-maru N-ro 5, estis nudokule videblaj, sed mikronaj cindroj kune kun la pluvo falintaj sur diversajn lokojn ne nur en Japanujo sed ankaŭ en Usono jam ne estis okule kapteblaj. Tiom vasta estis la efiko de la hidrogenbombo.

Ni aŭdas ke la usona registaro posedas ankoraŭ multe pli fortajn hidrogenbombojn ol la lastaj, kaj plie Sovetunio kaj Anglujo ankaŭ posedas ne malpli superajn ol Usono. Se oni sinsekve

eksperimentos ilin ĉiufoje, kiam oni inventis novspecajn, kiu ja povos garantii la sekurecon de la Mondo?

Ni firme kredas ke senlima konkurado en preparoj de tiaj atomarmiloj nepre kondukos la homaron al pereco. Ĉu sekvi Dion, aŭ sekvi Satanon — la homaro nun staras sur la vojkrucio.

Antaŭ 60 jaroj Fondintino de Oomoto avertis laŭ Diaj revelacioj: “La mondo neniel iros en ordo, kiel longe la homoj kultas al la homa saĝo kaj scienco.” “Nepre okazos la batalo de Dio kontraŭ Scienco.”

La averto estas simpla esprimo, sed profunda estas la instruo. Kiu ja gardos la homojn kontraŭ la fatala sorto de ili mem elvokita, kiam ili senprudente misuzas siajn saĝon kaj intelekton por fari tiajn ekstermilojn kiaj estas atomarmiloj? Dum la moralo, humaneco kaj konscienco subtenados la mondon, la homaro pace kunprosperos sub la eterna Dio. Sed, se milito, atomarmiloj aŭ despotismo prenis hegemonion super la mondo, la homaro nepre enfalus la plej malbenitan tragikan sorton, por kiu Diablo intrigas. La Fondintino avertis: “Konvertiĝu senprokraste!”, kaj por la okazo, se la homaro restos indiferenta, ŝi kuraĝis diri per *teruraj* vortoj: “La homaro malmultiĝos ĝis 3 procentoj.” Kiel severaj la vortoj estas, kaj kiel reale ili nun sonas!

La Mondfinon profetis cetere Kristanismo, Budaismo kaj aliaj multaj religioj. Kaj la Mondo nun alfrontas la momenton de l' Fino. Kiun vi preferas, Dian vojon aŭ Satanon, la eterne prosperan aŭ la perein? Forpelitaj estu tiuj stultuloj, kiuj trovas valoron kaj signifon en tia “Monstro de la Jarcento”, kia frakasas la konsciencon de la mondo, detruas Dian volon kaj pereigas la vivon de la tuthomaro. La Bikini-akcidento estu la ĉiela alarmo instigi la ekstaron de l' tuthomaro, por ke tiaj brutaj agoj senprokraste estu nuligataj.

Karaj legantoj, ni sincere alvokas ke vi, esp-istoj, kiuj havas firman konvinkitecon de pacaj batalantoj, ĝisoste enkorpigataj de Esp-ismaj internaj ideoj, unuiĝu en firma solidareco kaj kune kun

ne-esp-istaj kunfratoj batalu por savi la homaron el la danĝero nun minacanta. Vi konsentos pensi ke tiuj, kiuj eksperimentos atombombojn sur kia ajn parto de la mondo, estos malamikoj de la homaro. Se ni triumfos per niaj unuigitaj fortoj super ĉiuj malamikoj por enkonduki atomenergion ekskluzive en pacan industrion kaj krei novan mondon sen milito, la malbenindaj hidrogenbomboj male plenumos historie gravan rolon por defendi la Trian Mondmiliton. Ĉu Dio venkos aŭ Scienco venkos, tio ja dependas sole de l' homoj mem.

La 5-an de aprilo okaze de la printempa Oomoto-festo en Ajabe speciala kunveno de UHA-membroj estis alvokita por la konsidero pri la nuna grava momento kaj oni unuanime akceptis la ĉi-suban rezolucion por vekti la publikan rekonsideron. Kaj post kelkaj tagoj disvolviĝis la landskala kampanjo kolekti subskribojn por la Petskribo kontraŭ la atombomb-eksperimento en la nomoj de UHA, Oomoto Junulara Asocio kaj Oomoto Virina Asocio. La dokumenton oni alsendos al UNO kaj samtempe la mesaĝon rilatan al ĝi oni sendos al diversaj ĉefaj gvidantoj de la mondo. (Pri ĉi tio ni povos informi sur la venonta numero de OOMOTO.)

La Redakcio



Petskriba kampanjo en Osaka

## Rezolucio

La influo de eksperimentoj de hidrogenbomboj, plenumitaj en Pacifiko, donis ne nur al japanoj sed ankaŭ al ĉiuj homoj de la mondo neordinaran ŝokegon kaj la tuta homaro nun rekonis ke ĝi alfrontas momenton de krizo.

Laŭ Diaj revelacioj ni avertadis ke atomarmiloj neniam kondukas al la mondpaco sed ilia senlima evoluado fine forpereiĝos la tutan homaron. Ni ankaŭ asertadis ke por la efektivigo de la mondpaco ne restas alia vojo krom konverti la homaron al la principo de la universala homamo por starigi la mekanismon de mondfederacio, kiu bazos sin sur la amo kaj la vero. Nu, la eksperimento de hidrogenbombo ĝuste pruvis nian aserton kaj akcelis la decidon de la homaro.

Jam ne estas malfacile diveni, ke estontaj eksperimentoj mem de hidrogenbomboj povas difekti multajn el niaj homfratoj, kiel longe oni ne povas bremsi per sciencaj teknikoj la nesondeblan efikecon de la bombo, nek kapablas doni certan garantion pri la preciza limo de ĝia influo.

Nun konstatinte ke ni, japanoj, baptitaj jam trifoje per terura radioaktivo de atombomboj, havas la devon kaj rajton apelacii en la nomo de la homaro, ni petas kaj postulas:

1. Ĉiuj ŝtatoj senprokraste ĉesigu la produkton kaj la eksperimenton de hidrogenbomboj kaj similaj.

2. El la vidpunkto de la nobla humaneco ĉiuj atomarmiloj estu forigitaj.

3. La administrado de atomenergio estu transmitita al internacia organizo por ĝia paca utiligo.

*Hidemaru Degûci*

## Memornoto

Se la religio ne povas ampleksi eĉ la modernan sciencon, mi pensas, ke ĝi estas superstiĉo.

Kompreneble, la moderna scienco ankoraŭ estas tute nematura kaj plena de hipotezoj. Sed se religiulo ne kapablas prijuĝi la korektecon aŭ nekorektecon de tiu aŭ alia hipotezo el la vidpunkto de spiritualismo, ni povas diri, ke lia religio ne originas de la Vera Dio.

Se estas vere, ke Dio gvidas nin, la homojn, pere de l' anĝeloj, estos ankaŭ vere, ke ni estos facile montritaj pri la korekteco aŭ nekorekteco de tia afero, kia estas la scienco, elpensajo de l' homa cerbo.

Se ni estas la *perantoj* de Dio en la vera senco de la vorto, estas nature, ke ni povos prijuĝi la diversajn fazojn de la moderna socio, kaj ni povos ankaŭ gvidi la socion.

Se la religio estas por la homoj, la religianoj ne devas malhavi la plenan komprenon pri ili; se la religio estas por la moderna epoko, la religianoj ne devas malhavi la plenan komprenon pri ĝi.

La nunaj homoj kaj la nuna mondo — se la unuaj ne komprenas la lastan, kiel ili povus ĝin savi?

Kio estas pli kaj pli fariĝinta nur post longa tempo de konstanta homa pensado, tio estas, eĉ se malperfekta, la scienco moderna. Ĝi do estas, por ne diri la helpon de Dio nevidebla kaj por supraĵe diri, ja la kristaliĝo de la homaj klopodoj. Ĝi ne fariĝis tute ne hazarde en unu nokto kvazaŭ mielo el ĉielo.

Tial, ignorante la sciencon, prediki Dion kaj prediki la mondon estas afero tro nelogika por la modernaj homoj.

Kiel longan tempon la homaro ĝis nun spertis amarajn sortojn

kaŭze de la religia malbenita superstiĉo! Jam tiom harditaj, ke la homoj ĵus komencis apogi sin sur sia propra forto!

La scienco estas rimedo, per kiu Dio provizis la homojn sur la tero, por ke ili fine komprenu Lin.

La vera religio ne malakordas kun la scienco. Sed kiuj *komprenas* senpere de tia surtera rimedo, kia la scienco, estas nur la homoj jam ĉi tie aliĝintaj al la regno ĉiela.

La absolutan liberon havas ja neniu krom la Kreinto. Sed ĉiu kreitaĵo havas certan liberon al si permesatan. En la kadro de tiu ĉi libero ĉiu aspiregas disvolvi ĉiujn siajn kapablojn.

Kaj se aliaj kreaĵoj entrudiĝas en la kadron de tiu ĉi libero permesata, tio estas netolerebla. Estas senbezzone diri, ke la homoj — junaj kaj maljunaj, riĉaj kaj malriĉaj — devas esti singardemaj inter si por ne transpaŝi en la limojn de alies libero. Respektu la karakterojn reciproke, kaj la enŝoviĝo, se nepre necesa, estu minimuma.

Penso estas forto; ĝi estas ekzisto. Ricevante nenan influon deekstere, oni ofte turmentas sin mem anime kaj korpe en si pensante diversajn aferojn — plejmulte malbonajn. Malsaĝa afero!

Kiu havas firman kredon, tiu havas malmultan memamon, ne maltrankviliĝas per bagateloj, ne vundas sin timante senkaŭze pri ĉio, kio okazas al li.

Penso estas forto; ĝi estas genero; ĝi estas ekzisto. Ju pli multfoje la sama penso estas ripetata, des pli klara fariĝas ĝia bildo. Tio ĉi estas vera pri la penso malbona same kiel ankaŭ pri la penso bona. Malbela pripensata malbelon alportas. Belo pripensata belon alportas. Kion oni pensas, tion oni ricevas. Tio ĉi estas la unika leĝo de la spirita mondo.

Faru kiam vi devas,

Ne faru kiam vi ne devas.

Kiam do tempas, ke mi devas?

Nu, kiam via koro spontane inklinas,  
aŭ kiam la cirkonstancoj postulas!

En la mondo, kie la homoj fizike vivas, ekzistas la malliberejoj, en kiuj la krimuloj verdiktitaj estas entenataj en la daŭro de fiksita tempo. Tia simila afero devas esti okazanta ankaŭ en la mondo, kie ni spirite vivas. Se la aferoj de iu ne iras glate, kiel li deziras, pro iuj aŭ aliaj diversaj kaŭzoj, tio estas, ĉar lia spirito estas "malliberigita." La personoj, kia estas li, agus plej bone akceptante la cirkonstancon tia, kia ĝi estas, dum la konsumiĝo de la tempo — kvankam al kelkaj el ili povus okazi frutempa liberigo.

Dum la spirito de iu estas malliberigita, ĉio, kion li intencas fari, iras nur fuŝe. Cetere, lia koro estas peza kaj li ĉiam estas negativa.

Kvankam ne ekzistas la klasdistingo absoluta, certe ekzistas la relativa. Per tiu ĉi, la socia ordo estas tenata.

Ĉiu sistemo, kiu ignoras la ordon de la *naturdotita* klasdistingo ĉe la homaj *spiritoj*, kondukas fine al socia malordo.

En la okuloj de Dio, la vivkondiĉo de homoj estas kompatinda. En la okuloj de homoj, la vivkondiĉo de bovoj kaj ĉevaloj estas kompatinda. Tamen por ŝanĝi al ili la vivkondiĉojn radikale sin trovas nenia rimedo.

Bovoj estu bovoj, ĉevaloj ĉevaloj kaj homoj homoj dum ili vivas kiel tiaj respektive. Vivu ili plejeble strebante!

Oni eraras pro nescio. Oni dubemas pro scio. Prefere, tamen, mi estu la lasta. La plej kompatinda estas tiu, kiu ne havas en si sian propran memkonscion. Sen propra juĝkapablo, tia vane vagas tien kaj reen laŭ la indiko de alies fingro. Ok personoj el dek estas tiaj en la mondo.



## Situacio de Nordo

*Tojuuro Murai*

Starante sur la norda poluso, la norda ekstremo de la terglobo, ni rimarkas ke tie mankas direktoj: oriento kaj okcidento. Se ni turnas de tie la rigardon ĉirkaŭen, ĉiuj rigardoj direktiĝas nur suden. Se ni alpaŝas en iun ajn direkton de la nordpoluso, ĉiuj paŝoj iras nur suden. Oni do povas diri ke ĉiu direkto de movo ekde la nordpoluso estas sudo kaj la deirpunkto estas nordo. Ligu per unu linio la nordon kaj la sudon, kaj starigu la linion tiel ke la nordo estu supre kaj la sudo malsupre. Vi stariĝu laŭlonge de la linio, jen la flanko de via dekstra mano estos oriento, de la maldekstra — okcidento. Resume nordo estas la origino de l' direktoj.

La terglobo estas dividita en du partojn: la supran kaj la malsupran. La unua estas nomata la norda hemisfero kaj la dua la suda hemisfero. Kaj estas atentinde ke preskaŭ tuta historio de la homaro originis en la norda hemisfero. La densa loĝateco, disvolviĝintaj ekonomiaj sistemoj,

internacia politikcentro kaj fonto de aliaj kulturoj, ĉi tiuj ĉiuj estas troveblaj en la norda hemisfero. Ĉetere pli kaj pli pruvigas ke granda provizo da naturaj materialoj estas en la ĉirkaŭaĵo de l' norda poluso.

Por orienti sin homoj antaŭ ĉio utiligas la polusan stelon aŭ kompason, serĉante kie estas nordo. Laŭ ĉina kaj samtempe japana esprimo oni diras "supreniri al nordo aŭ malsupreniri al sudo". Laŭ japana aŭ ankaŭ hinda kutimo oni kuŝigas la kadavron de mortinto, kapon al nordo. Nordo ŝajne estas la loko, kien reiras la homa animo post la morto. Interalie mi pensas ke la polusa aŭroro estas la plej bela artaĵo de la Granda Naturo.

La politika principo de antikva Ĉinujo instruas ke tronado povas esti tenata de "alfronti al sudo, sin apogante sur nordo". La Ĉina litero de 北 (Prononcu laŭjapane: Kita. Ĝi signifas nordon.) estas formita per kunligo, dorso ĉe dorso, de du samaj literoj de 人 (Prononcu: Hito. Ĝi signifas homon.); tio subkompren-



igas ke afero disvolviĝas ambaŭ-flanken de unu elirpunkto.

Ĉirkaŭ la areno de Sumooluktado (la japana nacia sporto) oni starigas kvar stangojn en kvadrata formo por montri direktojn. Kaj la norda flanko nomiĝas la fronto, la suda la malfronto.

Tiel ilustrante mi ne povas ne konkludi ke la naturo, homaj vivoj, geografio, historio — ĉio ŝajne evoluas havante sian centron en nordo.

Dum la mondmilito II por transporti al Sovetunio sian grandparton da helpa municio Usono utiligis la arktan regionon, kiel ĉefan vojon. Al mi ŝajnas ke de nun ĝi ludos multe pli gravan rolon en la mondhistorio.

La monda aervojo nun faras epokfaran evoluon dank' al la utiligo de la nordpolusa linio. Post la malfermo de Tokio-Osla linio, lastatempe sekvis ankaŭ la aerlinio de Tokio-Londono, kio ekstreme mallongigis la distancon inter Oriento kaj Okcidento.

La nordpoluso, konsiderita kiel glacimontaro, estas, en vero, vasta, profunda maro kovrata de dikega glacia tavolo. Oni diras ke baldaŭ estonte ĝin trakuros submarŝipoj. Supozeble oni pretigos ankaŭ ŝarĝ-submarŝipojn

kaj pasaĝer-submarŝipojn, kiuj veturos sub kaj tra tiu virga maro. Tiam la martrafiko inter Oriento kaj Okcidento ankaŭ neimageble ŝanĝiĝos.

La naturprovizoj en la arkta cirklo ŝajnas esti mirinde riĉaj. La mortinta Stalin konsilis jam antaŭ longa tempo ilian ekspluataton, kies diversaj planoj nun estas efektivigataj. Aliflanke d-ro Armstrong, estro de Nordpolusa Instituto en Kembriĝo Universitato publikigis la detalan studon pri la multspecaj naturprovizoj en nordo en sia bona verko "Northern Sea Route". Krome estas opinioj, ke la marfluo kaj klimato en la arkta cirklo estas ŝanĝiĝantaj, tiel ke fiŝoj grupiĝas celante norden. La aktuala historio ial ŝajnas grandpaŝe evolui kun denordaj inspiroj.

Mi pensas ke per la nunaj mondkartoj, kia de Mercatora stilo, oni ne trovas ion, kio ilustras la plej altan homan idealon unuigi la mondon. Tamen, se oni malfermas karton, en kies centro estas desegnita la norda poluso, same kiel en la flago de UNO, oni vidas ke preskaŭ ĉiuj gravaj punktoj de la mondo situas en cirklo ĉirkaŭ la nordpoluso. Eŭrazia kaj Amerika Kontinentoj renkontiĝas (*Al p.44*)

## Kelkaj Komentoj el UHA-Ĵurnalo

### Okcidentaj teknikoj por Orientaj saĝoj

D-ro Reuther H. Evans, ĉefdirektoro de UNESKO, kiu faros post nelonge inspekt-vojaĝon al Ekstremoriento por 5-semajnoj, parolis jene (laŭ USIS, Parizo, 11 de jan.):

“Al mi ŝajnas, ke okcidentaj teknikoj estas tro alte taksataj, ke ili riĉigas la orientajn popolojn. Sed, en efektiveco, por eŭropaj malfeliĉaj popoloj venis la tempo, kiam ili devas multe pli klopodi por utiligi al si la ‘saĝon’ de la orientaj popoloj.” La aserto ja estas signifoplena por ambaŭ mondoj okcidenta kaj orienta.

La historio de la moderna epoko rakontas ke Oriento kaj Okcidento estis du apartaj mondoj, kiuj kontraŭstaris unu la alian kaj la okcidento ekspluatis la orienton ĉiam rigardante ĝin malrespekte. Ĉio ĉi tio kaŭzis la tragedion kaj konfliktojn, kiajn ni vidas hodiaŭ. Pro sia troa fido je la supereco en teknikoj Okcidento malestimis Orienton kaj metis ambaŭ mondojn en rilaton de mastro al servanto. Pro tio, kreiĝis en parto de la terglobo la malluma mondo, en kiu plenas malamo kaj rezignacio. Pro tio, Oriento estas tiel malkuraĝigita sub la okcidentaj influoj, ke ĝi forgesis sian rolon aŭ devon por averti aŭ morale gvidi Okcidenton. Pro tio, estas do nature, ke unu invitis al si malrespekton de l’ alia, kaj la alia fine perdis sian vojon.

La ĉefdirektoro plue parolis jene: “UNESKO intencas gvidi ĉiujn naciojn prosperi kun siaj propraj kulturoj. La popoloj de Azio ne havas antaŭjuĝon

kaj malindulgon kontraŭ kulturaj diferencoj. Estas dezirinde ke ili restu same indulgemaj en la estonteco kiel en la pasinteco.”

Se salo perdis sian salecon kaj floro sian koloron aŭ aromon, ili plu ne meritas je si mem. Ĉiu havas sian proprecon. Same ĉiu gento havas en si propran “jaŭnaturan” kulturon kaj ellasas malsaman aromon de la alia. Tamen, se oni konsideras el la universala vidpunkto ke ĉiuj gentoj egale konsistas el homoj, oni povas konstati ke en la fundo de individuaj kulturoj fluas “io”, kio unuigas la tutan mondon. Universaliĝo sur la bazo de individuaj ecoj povas esti la vera fazo de la universala kreado. Japanujo, kiu forgesis sian proprecon, ne plu povas esti Japanujo akceptebla en la mondo. La leĝo de mondkulturo ne postulas la forigon de individuaj ecoj; male, ĝi postulas ilian sanan evoluon kaj la unuecon en la fundo de la malsamaj ecoj.

Trad. S. Takahaŝi

### “Per-ama Revolucio” en Francujo

En februaro Parizo estis atakita de malvarmego la plej intensa en la pasinaj 15 jaroj. Okazis la movado de “Per-ama Revolucio”. La gvidanto estis Abbé Pierre, kiun oni povus nomi “pastro ĉifonista”, simila al la iama San Francesco d’ Assisi.

La movado originis: en la parlament-ejo la deputitoj malaprobis la leĝ-projekton pri monprovizo je la urĝe bezonata domkonstruado. Tiun nokton

Ministro Maurice Lemaire de Rekonstruo ricevis de pastro Pierre la publikan leteron kun la grava informo ke Marc Petit, 4-monata infaneto, frostmortis ĉe kvartalo de malriĉuloj en la apudurbo de Parizo. La letero pikis la konsciencon de la ministro kaj pro memriproĉo li afablis ĉeesti la funebran ceremonion por la infaneto. Ĝi cetere okazigis tut-nacian disvolviĝon de la helpmovado kaj post kelkaj tagoj jam tute malaperis la mizeraj figuroj de senhejmuloj el la frosta Parizo. Policanoj laŭordone kondukis ilin al senkostaj gastejoj, kaj ĉiuj komunumestroj laŭ-instrukcie ne kuraĝis forpeli ilin dum daŭris la malvarmego. Jen estas en Francujo la konscia ŝtatistiko kaj la amoplena religiisto!

Granda estis la reeĥo de tiu ĉi Perama Revolucio. Por subteni pastron Pierre laboristoj ĉiutage faris unu horon da superlaboro, ĵurnaloj malŝparis sian spacon por senpaga anonco por kolekto de kontribuajoj, teatroj servis per bonfaraj prezentadoj. La rezulto de 5 tagoj nur en Pariza distrikto estis 345.000 dolaroj, 15.000 lankovriloj, 6.000 supervestoj, 5.000 kompletoj, 5.000 ŝuoj kaj tiel plu.

La movado, kiun komencis la humanista pastro, faris la duan paŝon. t. e. la movado de "Donu laboron al senhejmuloj". Certe la sekvonta paŝo estos por konstruigo de kolektivaj domoj.

La pastro naskiĝis en Lyons en 1912. Lia propra nomo estas Henri Groues. Dum li iam okupiĝis en la kontraŭgermana kampanjo, li nomadis sin "Pierre". Kvankam li arestiĝis dufoje de geŝtapo, li sukcesis forkuri ĉiufoje. Post la milito li foje okupis la seĝon en la parlamento kiel ano de Popola Respublika Partio, kaj foje vojaĝis transmare al Usono por la Mondfederacia

movado.

Lia loĝejo estas en la eksterurbo de Parizo. En la malantaŭa korto de lia duondetruita domo estas metita grandamaso da eluzitaĵoj. Ili estas utiligitaj por projektataj "kolektivaj domoj".

Dum la tago, li gvidas la grupon de ĉ. 350 vagabondoj, kiuj konsistas el ekskrimuloj, senmonaj ftizuloj, iamaj drinkemuloj kaj aliaj por "ĉasi" en la balaajuloj kaj rubejoj de la urbo. En la nokto, li iras tra la urbo por kolekti senhejmulojn. Reveninte hejmen li dormas nur 3 aŭ 4 horojn inter puŝigantaj kunhomoj.

La agado de la pastro kompreneble ne estas tiom potencata, ke ĝi kapablu nuligi sociajn malbonojn ke ĝi reformus la politikan aŭ ekonomian sistemon. Sed se oni atendus grandskalan reformon nenifare, oni devus atendi poreterne. El tiu ĉi vidpunkto, la movado de la pastro estas signifoplena kaj imitinda de ĉiuj humanistoj de la mondo.

Trad. J. Umeda

## Pura politiko en Filipinoj

Rilate la ŝtadadministradon en Filipinoj oni jam de longe raportadis ke ĝi prĉskaŭ putras venenite de multaj koruptaj agoj de Ĥ oficistoj. Unuvorte ĝin makulis tro da skandaloj. Eksprezidento Quirino ankaŭ ne sukcesis perfekte nuligi tian aĉan famon dum sia prezidenteco. Vere ĝi prezentis la plej malfortan punkton de Filipina ŝtato. Tamen, la afero nun estas renovigata.

En lasta januaro la nuna prezidanto Magsaysay publikigis la liston de sia tuta posedaĵo. Tio ja estis frapa ekzemplo. Laŭ ĝi la saldita kalkulo de lia havo estis \$ 13,179.17 en la dato de 30,

dec., 1953 t.e. la tago de lia enoficiĝo al prezidanto. El tio oni povas klare vidi ke li estas ne riĉa.

Por kio li tion faris? Por nenio alia ol ke ĉiuj ŝtataj oficistoj sekvu lian iniciatitan ekzemplon. Laŭ lia programo ili devis fari oficialan anoncon pri sia havo antaŭ la fino de januaro.

Kaj tio estas preparo por la okazo de ilia eksoficiĝo, kiam ili devas ripeti la samon por ke oni facile vidu, ĉu ili gajnis dum la servado nejustan monon, aŭ ne. Por diri la veron tia metodo ne estas la patento de Filipina prezidanto. La nuna Meksika prezidanto, jam antaŭ ol li, faris la samon kun la sama celo, kiam li elektiĝis kiel prezidanto. Tiam Meksiko ankaŭ estis ĝenerale konata pro multaj koruptoj same kiel Filipinoj. Krom ili, Stevenson, kandidato ĉe la pasintaj elektoj por la ofico de Usona prezidanto kaj Nixon, kandidato por la ofico de vicprezidanto, ambaŭ faris publikigon de l' havaĵoj por pruvi sian purecon. Tio restas en nia memoro ankoraŭ freŝe kiel simpatia anekdoto.

Reviviĝantaj nacioj tiamaniere celadas puran administradon. Tia tendenco kreiĝas ne sole de la streĉiĝo de la prezidantoj mem, sed de la bona konscio de l' popoloj kiu ĝin subtenas kaj akcelas.

Politiko devas esti justa. Justo originas en pureco. Se pureco mankas al politiko, ĉi tiu neniam fariĝas justa. Komparante la nunan staton de l' japana politika kampo kun la tendenco en la menciitaj landoj, mi ne povas deteni senliman bedaŭron kaj honton.

Trad. Ŝ. Uemura

(De p. 41) ĉirkaŭante la nord-poluson je la distanco de nur duoblo kaj duono da larĝeco de Mediteranea Maro.

Koncerne la nordan problemon, mi ne povas neglekti la fakton, ke Dio, kiu ekposedis Nao Deguĉi, Fondantino de Oomoto, kaj pere de ŝi alvokis al la homaro, per si mem sin nomis "Uŝitora-no-Konjin". La nomo ja havas profundan signifon, tamen la ordinara japana vorto "Uŝitora" esprimas la sencon de nordoriento. Mi kredas ke Dio alparolis la homaron kiel la voĉo de Nordo. Mi menciis ĉi-supre ke nordo estas la centro kaj bazo de l' homaj historio kaj vivo sur la tero. Do oni povus diri ke la voĉo de "Uŝitora-no-Konjin", Dio de Nordo, estas de la reganto de la Mondo. Trad. Z. Kacura

### Por nia Botanika Ĝardeno

Ni danke kvitancas jene:

32. S-ro Chiaruttini Aldo, Udine, Italujo: semoj de tritiko kaj 2-specaj floroj
33. S-ro Georg Lisbjerg, Kolding, Danujo: semoj de 21-specaj legomoj

**La abonkotizo de OOMOTO malaltiĝis.**

**Vidu la lastan paĝon!**

## Vilaĝano kaj Serpento

Ezopo diras ke vilaĝa,  
 Helpema viro sed ne saĝa,  
 Dum vintra tago proeninte  
 Ĉirkaŭe de bieno sia,

Ekvidis sur la neĝ' serpenton sin sterninta.  
 Ĝi estis kripla kaj malvigla kaj glacia,  
 Senpova kaj vivonta nur dum horkvarono.  
 La vilaĝan' ĝin prenas, portas ĝis la domo;  
 Kaj ne konsiderante pri la luodono

De faro kun merito tia,  
 Etendas ĝin laŭlonge de l' fajruj',  
 Varmigas ĝin kaj revivigas.

En la rigida best' apenaŭ varm' efikas  
 Ke novan vivon kaj koleron ĝi retrovas.  
 Ĝi levas iom kapon kaj ĝi siblas tuj;  
 Kaj faras longan faldon, kaj eksalton provas  
 Ĝis sia bonfaranto, patro kaj savulo.  
 "Maldanka, jen la pago! diras la krudulo,  
 Vi mortas!" Tiam li kolere juste agas,  
 Ekprenas sian hakileton, beston hakas,  
 Kaj tri serpentojn faras per duobla frapo:

La voston, unu stumpon kaj la kapon.  
 La saltetanta besto provas  
 Reunuiĝi; sed sukcesi ĝi ne povas.

Helpemo multon bonan portas;  
 Sed jen la punkto, kontraŭ kiuj?  
 Pri maldankuloj, ili ĉiuj  
 En la mizero fine mortas.

Jean de La Fontaine (Fabloj VI-13.)  
 El la franca tradukis: Lucien Thévenin

## Provizora Programo de la Esperanto-Postkongreso Rotterdam

- 7-VIII Je la 14a malfermo de la akceptejoj kaj informejoj, disdono de la dokumentoj. Je la 20a Gaja Vespero kun regalo.
- 8-VIII 13a Lunĉo; poste Granda Aŭtobusveturo tra la urbo kaj ĉirkaŭaĵo. 17.30 Komuna tagmanĝo.
- 9-VIII Posttagmeze granda ekskurso, i. a. tra la mondkonataj havenoj, kun komuna tagmanĝo ie survoje.
- 10-VIII Matene vizito al brandofarejo en Schiedam aŭ alia interesa fabriko. Poste lunĉo. Je la 20 Festvespero.
- 11-VIII Je la 10.30 kafe kaj kukajo poste fermo kaj adiaŭo.

La kongreskotizo, inkluzivanta ĉiujn nomitajn aranĝojn estas 40 guldenoj.

Hotelprezoj estas de 6. — ĝis 14.50 guldenoj por unu persono dum unu nokto. Matenmanĝo kaj trinkmono inkluzivaj.

Interesatoj sin turnu Al la LOKA KOMITATO de la ESPERANTO-POSTKONGRESO  
 Sekr.: S-ro J. M. J. Driesen,  
 Sam. Mullerstraat 7a  
 ROTTERDAM — WEST  
 Nederlando

## Pripensu ĉi tiun rasan problemon

Staras rasbaroj nur inter *barbaroj*. Tiaj ne ekzistas inter la esperantistoj. Sed la esperantistoj devas ilin disrompi.

Josephine Baker, mondfama dancistino-kantistino el Perizo, kiu vizitis Japanujon por aŭmoza prezento por la bonfarto de miksrasaj orfoj, faris prelegon pri la raso problemo, la 2-an de majo, ĉe la Osaka Jōgakuin. Kiel oficiala delegito de Propagando Kontraŭ Rasismo, Ligo de Internaciaj Kultur-Asocioj, ŝi parolis pri la raso problemo en Usono, Danujo (rilate Grenlandon), Belgujo (rilate Belgan Kongon), Norvegujo kaj tiel plu, akcentante ke neniam feliĉo estas konstruebla sur malfeliĉo. Jen nur kelkaj paragrafoj el ŝia enhavoriĉa longa parolado.

“Vi mem demandus kial mi, kiu havas tiel multan admiron pri viaj kutimoj kaj kiu estas tiel fiera pri mia originala Afrika fono, kial mi nun parolas alian lingvon ol mian propran originalan de miaj Afrikaj prapatroj.

“Mi povas respondi al vi dirante ke kvankam mi ne bedaŭras paroli diversajn lingvojn, tio estas ne mia elekto ke mi parolas ilin. Ili estas nur la lingvoj, kiujn oni lernigis al mi, kaj poste en mia vivo kiam mi kapablis lerni mian originalan lingvon, mi ne havis eblecon aŭ tempon, ĉar mi jam aliĝis al tiu ĉi militiro por la libereco de la homaro kaj jam prenis sur miaj ŝultroj tiun ĉi ŝarĝon kaj la respondeco estas tiel granda, ke ĝi forprenas mian tempon.

“Mi poste eltrovis, ke la lingvoj, kiujn mi parolas, estas pli internaciaj kaj ebligas al mi ĉirkaŭiri la mondon farante multajn amikojn por la idealo en kiu mi kredas. Jen kial mi ne parolas la lingvon de miaj prapatroj.

“Vi eble mirus ankaŭ kial mi portas sur mi okcidentan vestaĵon. Mi povas respondi al via penso dirante ke se mi estas vestita alimaniere ol miaj prapatroj, tie ankaŭ mi ne havis mian elekton. Ĉar oni sendis miajn praaĵojn al Usono kiel sklavojn kaj ili perdis siajn nomojn, siajn lingvojn, personecojn kaj dignon. Tiamaniere oni devigis ilin akcepti kiajn ajn vestaĵojn, kiujn oni donis al ili.

“Ili estis ordonataj vestiĝi kiel la mastroj deziras, kaj kvankam tiuj ĉi vestaĵoj ne akordas kun ilia koro ili devis akcepti ilin nure pro neceso.

“Kio estas pli malbona, tio estas, jarojn poste la vestaĵoj, kiujn miaj prapatroj estis devigataj surmeti, alportis al ili humiligon kaj malfeliĉon ĉar ilia mastro primokis ilin. Dum multaj jaroj deposte tiuj el mia raso en Usono estis mokataj de la blanka popolo. Mi memoras ke nur antaŭ 15 jaroj ili estis nomataj simioj, plenvestitaj kiel cirko-ĉevaloj. Kaj nur antaŭ 2 jaroj okazis ke kolorhava virino vere estis stampita kiel eleganta!

“Tio estas mi, kiu havis la honoron disrompi tiun ĉi baron en Usono inter la kolora kaj la blanka, ĉar mi gajnis la titolon de la plejbele-vestita virino de la jaro el la 10 plejbele-vestitaj virinoj de la mondo. Malfeliĉe tamen pro la tieaj cirkonstancoj kaj pro la problemo inter la kolora kaj la blanka, tio ĉi ne estis publikigita kiel tio devus esti okazinta se mi estus blanka, sed la tuta blanka

popolo ne deziris ke tio estu diskonigita, ke negrino gajnis tiun ĉi titolon. Jen vi vidas, tiuj ĉi vestaĵoj alportis al ni ne ĉiam feliĉon."

La supran ekstraktaĵon ni esp-igis el *The Mainichi*, anglalingva taggazeto. Ĝin ni utiligas ĉi tie NE por inciti la senton de iu raso kontraŭ alia, sed nur kiel la enkondukon al la sekvantaj prikonsideroj pri iom alia sed neniel malpli grava ras-problemo.

1) Se temas pri la homraĵoj, niaj Afrikaj fratoj havas por si tian multlingvan pledanton, kia Josephine Baker, antaŭ la monda publiko, kaj kapablaj kia ŝi, feliĉe, estas ne malmultaj el ŝia raso.

2) Tamen, en la mondo vivas aliaj homgrupoj *ignorataj* kaj "same malaltaj", laŭ okcidentaj etnologoj, "kiel la Afrika raso". Nome, la *polinezianoj*, la *melanezianoj* kaj aliaj, kiuj loĝas en insuloj grandaj kaj malgrandaj de la Pacifiko.

3) Rilate ilin, ekstaris antaŭ ni la rasa problemo de tute nova kaj nepardonebla speco post la 1a de Marto, 1954, kiam la hidrogenbomba eksperimento de Usono difektis la vivon de la almenaŭ ĝis nun nombritaj 23 japanaj fiŝistoj, 236 indiĝenoj de Marŝal-insularo kaj 28 amerikanoj.

4) La vivo de la en 2) nomitaj homgrupoj kaj la fekunda tero, de kiu dependas ilia vivo, estas hodiaŭ elmetata al ĉiu-ajn-momenta minaco de la mortiga radio-aktivo kaŭze de la ankoraŭ provotaj similaj eksperimentoj — kie ajn ili okazu en la Pacifiko, ĉu en la maro teritoria, aŭ publika.

5) Por la nomitaj homgrupoj kiuj estas senprotektaj kaj tute ne ekipitaj eĉ per unuopa amaskomunikilo por morala memdefendo, ni, la Homaranoj pledas al la tutmonda esp-istaro, ke la vivo de *la ignorataj homfratoj* estu protektata per *nia* esp-ista voĉo!

6) Ni rekonas, ke nia voĉo estas malgranda. Sed se ĝi eĥos kaj reeĥos tra la mondo helpe de ĉiuj seriozaj kaj aktivaj esp-istoj en parolo kaj skribo, ni ne dubas, ke ĝi fariĝos sufiĉe "forta voko" por eventuale subigi la Monstron, kiun nia jarcento naskis.

Ĉar UNESKO, kiu iam bonvolis anonci, ke la valordistingo de rasoj laŭ la haŭto-koroloj estas tute sensignifa, ial mutas pri tiu ĉi grava afero, kaj ĉar ni kredas, ke nia esp-ista devo estas ne simple lingva, sed ĉefe morala sur la bazo de Homaranismo, ni publikigas ĉi tiun unuan artikoleon, dezirante mem vidi kaj ankaŭ vidigi al la "ekstera mondo", ĉu vere tuja, vasta kaj efika estas la esperanto-lingva kaj morala "ĉenreakcio" de la tutmondaj gesamideanoj se temas pri la batalo kontraŭ la scienca eksperimentado kun malhorma celo. Sukcesigu *nian eksperimenton* diskonigante nian vidpunkton\* kaj kontaktigante kun

LA RONDO DE HOMARANOJ,  
ĉe S-ro H. Hirose,  
66 Koyama-Nishiono, Kamikyo,  
Kyoto, Japanujo

\* Represo kaj traduko (plena aŭ parta aŭ resuma) de tiu ĉi artikolo estas tutkore petata. Anticipan dankon!

## Japana Kulturo

### Artoj en la Asuka\*-Templo\*\* Periodoj

Sango Uno

Dum la regado de la imperiestrino Suiko (ĉ. 600 p. K.) Budaismo oficiale envenis en la japanan kulturon, kiu estis senĉese influata de la kontinento kaj la duoninsulo.

La malgranda budastatuo de la 1-a bildo estas unu el 48 statuoj posedataj de Imperiestra Familio (konservitaj en la antaŭa Hoorjuji Templo\*\*\*). Ĝi estas farita el oro kaj kupro en la regtempo de Suiko. Kiel ĝia dimensio montras, la nacia entuziasmo al la fremda religio, Budaismo, ankoraŭ ne kreskis ekster individuaj interesoj. Ekzotika majesteco de ĝiaj elegantaj vestoj kaj ornamoj

estis sufiĉa por altiri la admiron de tiutempaj naivaj japanoj. Ĉu ne ĉarma estas la vizaĝo sensimetrie larĝigita? Ĝi ŝajne estas verko de iu naciianiĝinto, sed prezentas tre delikatan belecon kaj jam rafinitan formon kun kaŝita grandiozezo, kiu troviĝas en artoj poste naskiĝintaj en Japanlando.

La veneno de Budaismo en Japanujon estis epokfara evento, ĉar ĝi ne restis en la kadro de religia agado, jam ne parolante pri produkto de budastatuoj, sed ĝi radikale reformis preskaŭ tuton de la tiama japana kulturo, kies originalecon karakterizis la regado de malmultaj potencaj familioj, kiuj havis respektive sanktejon dediĉitan por la animoj de iliaj prapatroj, kiel adorcentron de la popoloj.

Cetere dank' al la enkonduko de la Konfucianismo, medicino, kalendaro, astronomio, farmacio kaj aliaj, rapide disvolviĝis la fundamentaj bazoj de la japanaj diversflankaj kulturoj, kiel ekz. literoj, artoj, ideoj, socio kaj politiko. Interalie la Budaismo kiu kunligiĝis kun la politiko, scienco kaj ideologio, fine florigis la pompan Asuka\*-kulturon. Ĝian grandiozecon impone pravas la rapida sinsekvo de nove konstruitaj grandaj budaistaj temploj de Hookooĵi, Koofukuĵi, Daikan-daiĵi, Jakuŝiĵi, Hoorjuĵi, Ŝitennooĵi k. a. Kvazaŭ ili ŝanĝis la tutan aspekton de japana vivo.

Kiel estis kun la japana propra beleco sub tiaj cirkonstancoj? Multaj konkludas, ke ĝi tute nuliĝis sub la intensa uragano





de la kontinenta tono. Kelkaj eĉ kuraĝas diri ke ekzistas nenio originale japana, sed nur imitaĵoj. Tia tendenco estas parte tiel forta, se ne ĝenerala, ke ofte personoj, kiuj iel akcentas pri la japana beleco, facile kondamniĝas kiel fanatikaj ŝovinistoj.


Sed, ĉinaj ideografiaĵoj, kondukita en Japanujon en tre malproksima tempo estis asimilitaj jam en la 5-a jarcento ĝis tiom, ke ili ludis en la skribado de l' japana lingvo la rolon de fonetikaj literoj per siaj sonoj senrilate kun siaj sencoj. Oni povas vidi sur elfosaĵoj de malnovaj kupraj speguloj ideografiaĵojn tiamaniere uzitajn. La famekonata Koĵiki (Kroniko de Malnovaĵoj) kompilita pere de la recito de Hieda-no-Are en 712 p. K., estas nacilingve skribita per tiuj fonetikaj signoj, dum la Nihon-ŝoki (Kroniko Japana) estas verkita de Princo Toneri en 720 p. K. en eleganta ĉina lingvo per ideografia skribado. Tio estas tre interesa kontrasto. Tamen, la Man'joŝu (Kolekto de Miriado da Folioj), la plej altvalora antologio de poemoj *ĉoka* (longa poemo) kaj *tanka* (mallonga poemo el 31 silaboj), konsistanta el 20 volumoj kun ĉ. 4500 poemoj, kaj kompilita en la komenco de la 8-a jarcento, ankaŭ estas skribita tute per ĉinaj literoj laŭ la sonoj. Tiuj ĉi faktoj rakontas, kiel fortika kaj ne facile fleksebla estas la japana skeleto. En tiuj faktoj oni povas vidi la kaŝitan brilon de la japana kulturo kaj kvazaŭ miri pri freŝaj herboj burĝonintaj sur la dezerto ruinigita de la flamego de l' kontinenta kulturo kun la mondskala amplekso.

La 2-a bildo montras la statuon de Miroku Bosacu (Majtreja Boĉisatvo) zorge konservata en la Ĉuguĵi Templo proksima de la Hoorjuĵi Templo. Ĝi

estas pli malpli granda lignoskulptaĵo ĉ. 2 metrojn alta, kvankam ĝi aspektas metalaĵo pro sia nigra brilo kaŭzita de la longtempa incensado. Oni povas diri, ke ĝi revivigis eĉ en la triumfanta prosperado de la Budajismaj belartoj la japanan originalecon, detruitan de la intensa influo de l' kontinento. Sed pli prave oni povas aserti, ke ĝi rekte enkorpiĝis nian spiriton.

Se en Japanujo oni farus popolan baloton por elekti la "F-inon Budastatuo" inter la ekzistantaj budastatuoj, ĝi nepre akirus la unuan aŭ duan lokon. La karaktériza beleco, kiu regas la statuon, mem elokvente parolas, ke ĝi ne estas io prunte prenita. Ĝi supozeble estas la verko en Hakuho-periodo\*\* (ĉ. 700 p. K.). Ju pli atente ni rigardas ĝin, des pli simpatia ĝi montriĝas. La milda kaj virga figuro, iel rondforma, la serenaj kaj klaraj tranĉosurfacoj kaj la maso trankvile sidanta, ĉio ĉi tio montras, ke





la statuo estas skulptita kun sento akra kaj samtempe tre delikata. Dum la budastatuoj ĝenerale prezentas al ni iajn transmondajn bildojn, ĉi tiu ja spiras la saman aeron, kiun ni spiras, kaj tio donas al ni trankvilan ripozon. Estas atentinde ke tia verko aperis nur cent jarojn post la Suiko-regado.

La budastatuoj en Tempjo\*\*-periodo, kiam la famaj Toodaiji Templo kaj grandega statuo de Budao konstruiĝis, vere estas produktaĵoj de la "ora epoko" de Budaismo en Japanujo. Efektive en la dirita epoko, la Budaismo en Japanujo, aŭ pli ĝuste, la japana Budaismo havis sian apartan idealon. Kaj konforme al ĝi progresis la formo kiel ankaŭ la enhavo de la tiamaj budastatuoj. Fine, dank' al la evoluado de la talento kaj skalo ili atingis ĝis tia maturiĝinta beleco, kian oni ne vidas eĉ en la verkaĵoj de Tang. En ilia stilo oni ja vidas grandiozan skalon, kiu harmonie kunfandas la artojn hindan, persan, ĉinan kaj eĉ korean.

La 3-a bildo montras la konstruaĵon de Ŝoosoin, imperiestra trezor-konservejo, kiu estas en la korto de la Toodaiji

Templo kaj konstruita samtempe kun ĉi tiu. en la regado de Imperiestro Ŝoomu (701 — 756). Tiu ĉi trezor-domo estas unika ankaŭ el konstrua vidpunkto. La neordinare alta planko kaj la muroj lerte aranĝitaj por teni aerumon kaj eviti malsekecon, donas plej bonajn kondiĉojn por la konservado. La enhavo estas granda kolekto de altgrade valoraj objektoj, portitaj en la 8-a jarcento ne nur el Ĉinujo kaj Koreujo, sed ankaŭ el la malproksimaj mondopartoj kiel Egiptujo, Mez-azio kaj Hindujo. Ĝi estas tiel malofta pompa kolekto, ke oni povas diri ke Imperiestro Ŝoomu sukcesis realigi en sia vivo la sonĝon de "Arabaj Noktoj". Ĝi konsistas el vestoj, mebloj, skribiloj, ludiloj, muzikinstrumentoj, kuraciloj, libroj, bataliloj, armaĵoj, metiaĵoj, kudriloj, ceremoniaj kaj budaismaj objektoj kaj aliaj; ilia tuta nombro kalkuliĝas kelkdek mil.

Okaze de l' morto de Imperiestro Ŝoomu (756 p. K.), Eksimperiestrino Koomjo por sia forta funebra sento kaj pro bondeziroj por lia animo oferis multajn heredaĵojn, kiujn li precipe amis, kune kun la inventaro al Vairokano en Toodaiji Templo. El diversaj vid-

punktoj, jam ne parolante pri la historia, estas netakseble altvalora fakto, ke tiuj ĉi trezoroj kaj inventaro estas kune konservitaj.


La 4-a bildo montras dukoloran argilaĵon (kun la kalibro je 37.5 cm kaj la alto je 4.8 cm) konservatan en Ŝoosoin. Ĝi estas glazurita kun verda desegnaĵo de *kanoko*\*\*\*\* sur la blueca blanka fono. En kategorio de tia-specaj pladoj aŭ vazoj troviĝas ankaŭ trikoloraj kun bruna koloro krom menciitaj, kaj ili ĉiuj ĝis nun estis juĝataj kiel elegantaj ĉinaj fajencoj.

Neniu povis pensi ke tiaj belaj fajencoj estis fareblaj per la manoj de tiutempaj japanoj. Sed iom post iom oni perceptis en ili pli japanan senton, ol la ĉinajn gustojn. Vere, ni konstatas ke la raiva abstrakteco de ilia stilo, la mirinda flueco de la *kanoko*-desegnaĵo kaj la majstra aranĝo pri la blankaj kaj verdaj spacoj prezentas tute alian specon ol la ĉinajn trikolorajn fajencojn, kiuj ideisme sidas senmove kun sia jam difnita formato.

Ilian gravecon ni atentis el ankoraŭ unu alia vidpunkto t.e. pripensas pri la deveno de tiuj ĉi trikoloraj glazuroj, precipe la verda. La origino de la verda


glazuro, kiu konsistas el kupro, stano, plumbo kaj sodo, prezentas ŝlosilon por diveni, laŭ kiu vojo transvenis antikvaj kulturoj. Kuraĝe mi povus aserti ke ĝi originas ĉe la bordoj de la rivero Nilo kaj venis al Japanujo vet. rante sur la fluo de la kulturoj tra Mediteraneo, Arabujo, Persujo, Turkestanujo, Okcidenta Mezaĵio kaj Ĉinujo. Ĝi ne estas objekto spontanee naskiĝinta en ĉiu loko, sed estas produktelebla nur tie, kie la kulturo atingis certan nivelon. Ĉu la metodo de ĝia produktado estas enportita en Japanujon aŭ ne, tio estas grava problemo ne sole por la ceramika kampo. Se pruvigis, ke jes, tio estos potenca atesto pri granda skalo de la kulturoj, kiuj atingis japanujon tiutempe.

Nu, ĉu la menciata argilaĵo verde glazurita certe estas japana produkto? Ni ne povas decidi nur per la intuicia juĝo pri ĝia esenca belo. Necesas prui per faktoj. Antaŭ kvar jaroj laŭ la sugesto de unu peco de disrompita malnova fajenco mi trovis ruinon de antikvaj fornoj, kie oni bakis verde glazuritajn fajencojn, kaj kies fondo ŝajnas esti preskaŭ samepoka kun la menciitaj fajencoj en Ŝoosoin. Mi ĝin trovis sub la monteto en la teritorio de Sue Sanktejo, kiu lokiĝas en Doki, Tamao-mura, Gamoo-gun, Ŝiga Gubernio. Ĝi estis la unika ekzisto, kiel fornoruino, kvankam disrompita pecoj aŭ postlasitaj fajencoj de l' sama speco troviĝis jam sufiĉe ofte. En somero de la sekvinta jaro mi trovis plu kelkajn grupojn da samspecaj fornoj en Niŝitani, Asahino-mura, Gamoo-gun, Ŝiga Gubernio. Per tio mi povas havi pli certan konvinkon, kaj la cirkonferenco de divenataj produktlokoj de japanaj trikoloraj fajencoj sufiĉe



mallarĝiĝis.

Ĉiuokaze, admirinda estas la belo de tiu ĉi dukolora plado, kiun oni perceptas en la flua vortico de *kanoko*-desegnaĵo. Ĉu ĝi montras la ondojn de l' japana enlanda maro, ĉu la puran akvon de valo sub rokoj, aŭ la brilantan fonton en arbaro? Al mi ŝajnas ke ĝi estas la belo naskebla nur en la delikata kvieto de Japanlando. Trad. La Red.



Trikolore glazurita plado

\* De la tagoj de Kromprinco Ŝootoku (573-621) ĝis la fondiĝo de la ĉefurbo Nara (710 p.K.), Asuka en Jamato-provinco ofte estis la politika kaj kultura centro, nutranta intelektan kaj spiritan grundon favoran al la rimarkinda kresko de Budaismo kaj de la belartoj. Tial, Asuka fariĝis la nomo de unu el la gravaj art-periodoj de Japanujo.

\*\* Oni ĝenerale subdividas arthistorie la epokon de *ricurjo* (ĉ. 300 jarojn post la Reformo en Taika (645 p. K.); *ricurjo* = leĝoj kaj reguloj kompilitaj laŭ la modeloj de la ĉina leĝaro de la Tang dinastio) kiel jene: periodoj de Hakuho, Tempjo kaj Kooĵin-ĵoogan. En tiu epoko la belartoj en kaj pri Budaismo plej flore disvolviĝis.

\*\*\* Hoorjuĵi Templo konsistas el pluraj konstruaĵoj, kiuj estas grazie grupigitaj por prezenti harmonian tuton kaj kiuj estas la plej malnovaj el lignaj konstruaĵoj de la mondo. Malfeliĉe fajrego okazis en la ĉefa templo, Kondoo, en 29 de jan., 1949, kaj la famekonataj murpentraĵoj estis difektitaj.

\*\*\*\* *Kanoko* laŭlitere signifas cervidon. Kanoko-desegnaĵo konsistas el malgrandaj alternaj makuloj similaj al tiuj, kiujn portas la haŭto de cervo.

## Anoncetoj

*Sveda Esperanto-Grupo* (David Sweden-gren, Floragatan 4, Boras, Sweden) havos Letervesperon 25 Junio 1954. Venu salutoj el la tuta mondo. Ni antaŭdankas kaj nepre respondas al ĉiu.

*La 10-a Internacia Junular-Kongreso de T. E. J. O.*, okazos 24-31 de julio en la konata Radio-urbo Hilversumo. Kostoj por la tuta semajno: programo, ekskursoj, restado kaj manĝado en la kongres-


ejo: por T. E. J. O. membroj f 55.- (Ned. mono) kaj por ne T. E. J. O. membroj f 60.-. Pluajn detalojn vi povas trovi en la Aliĝilo, kiun vi povas peti ĉe la Loka organiza komitato, Lobeliastraat 4, Hilversumo, Nederlando.

S-ro *Gunnar Jørgensen*, laborista esp-isto (Skovstræde pr. Nysted, Lolland Denmark), deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun tutmondaj samideanoj, precipe kun japanoj. Li garantias, ke li nepre sendos la saman kvanton da danaj.


Popolkantoj el Aŭstrio, Burgenland.

PRUVITA FIDELEGO


(17, Erprobte Treue: Es stehte in  
Baum...., El Ödenburg, 1909)




1. Jen sta-ras arb' en va - la fuhd, kun  
2. "A - di - aŭ, ka - ra, ho tre-zor! por  
3. Post la sep ja - roj en ĝar-den' ŝi  
4. "Ho ve-nu, ve - nu al al-tar' pro



1. lar - ĝa kro- no, for - ta trunk; ĉe  
2. ja - roj sep mi de - vas for!" "Se  
3. so - le i - ris por pro - men': raj-  
4. di - a ben' al ju - na par! Ja



1. ple - na lu - no ki - sis sin ju-  
2. dum sep ja - roj mi - gros vi, sen  
3. dan - te ve - nis jen sol - dat', ĉe-  
4. ĝo - jos ni ĝis vi - vo - fin' kaj



1. nu - lo a - man - ta, a - ma - tin'.  
2. vi - ro a - li - a re - stos mi."  
3. va - lo fi - e - ris dum pa - ŝad'.  
4. Di - o nur mem di - si - gos nin."

Trad: Hans Bauer

La melodio montras frapan similecon kun la ario de Uriel el la oratorio "La Kreado" de Haydn, 2-parto, n-ro 24: "Kun digno alta, jen ornam'....

## ESPERANTO-EKSPOZICIO EN MONTEVIDEO

Prof. *I. Lapenna*, Honorofica Direktoro de CED.

Okaze de la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo (de la 14-a de okt. ĝis la 13-a de nov. 1954) CED aranĝos, en kunlaboro kun la Urĝvaja Esp-Societo, grandegan Esp-ekspozicion. Ĝia celo estas prezenti en taŭga formo ĉiujn atingaĵojn de Esp. en la 66 jaroj de ĝia ekzistado. La ekspozicio estas unu el la ĉefaj branĉoj de la multflankaj klopodoj digne prezenti la aferon de la Internacia Lingvo en Montevideo. La ekspozicio havos jenajn fakojn:

- A. LERNOLIBROJ: 1) Ŝlosiloj; 2) Nacilingvaj lernolibroj de Esp.; 3) Internaciaj lernolibroj de Esp.; 4) Vortaroj.
- B. VERKOJ DE ZAMENHOF: 1) Originalaj verkoj; 2) Tradukitaj verkoj; 3) Nacilingvaj tradukoj de diversaj verkoj de Zamenhof.
- C. BELETRISTIKO: 1) Verkoj originale skribitaj en Esp.; 2) Tradukoj el nacilingvaj literaturoj; 3) Nacilingvaj tradukoj el Esp.
- D. SCIENCO KAJ FILOZOFIO: 1) Fakaj vortaroj kaj terminaroj; 2) Verkoj originale skribitaj en Esp.; 3) Tradukoj el naciaj lingvoj; 4) Tradukoj el Esp. en naciaj lingvoj; 5) Esperantlingvaj resumoj al nacilingvaj verkoj; 6) Gravaj rezolucioj pri la valoro de Esp. por sciencaj celoj.
- E. GAZETOJ KAJ REVUOJ: 1) Ĝeneralaj gazetoj jam aperintaj aŭ nun aperantaj; 2) Literaturaj revuoj; 3) Sciencaj gazetoj, revuoj kaj bultenoj; 4) Aliaj specialaj revuoj inter kiuj ankaŭ la nacilingvaj revuoj kun Esp-aj resumoj aŭ rubrikaj. (En tiu-ĉi fako estos ekspoziciitaj ĉiuj iom gravaj gazetoj kaj revuoj, sed, se ili ne plu aperadas, nur tutjaraj kompletoj).
- F. DIVERSAJ PUBLIKAĴOJ: 1) Turismaj gvidlibroj; 2) Prospektoj pri diversaj urboj; 3) Afŝoj kaj prospektoj de diversaj entreprenoj kaj institucioj.
- G. RADIO: Per trafa desegnaĵo prezenti la evoluon de la Esp-lingvaj elsendoj; listo de radiostacioj, kiuj elsendas en Esp.; se iel eble, estos organizita disaŭdigo de Esp-aj elsendoj dum la ekspozicio mem.
- H. FILMO: Se iel eble, estos organizita prezentado de Esp-lingvaj filmoj.
- I. KONGRESOJ KAJ KONFERENCIOJ: Unuarangaj fotografaĵoj pri Universalaj Kongresoj, pri fakaj kongresoj kaj konferencoj, pri Internacia Somera Universitato, pri internaciaj kursoj, someraj semajnoj, ktp.
- J. ORGANIZO DE LA ESPERANTO-MOVADO: 1) UEA kaj listo de landaj asocioj kaj fakaj organizaĵoj aliĝintaj al UEA; 2) Listo de aliaj internaciaj Esp-organizaĵoj; 3) Listo de la ĉefaj Esp-eldonejoj. En tiu ĉi fako troviĝos mapo de la mondo, sur kiu estas signitaj la urboj, en kiuj troviĝas: a. delegitoj aŭ fakdelegitoj de UEA (verda flageto); b. Esp-eldonejoj, redakcioj de gazetoj kaj revuoj, sidejoj de Esp-aj internaciaj organizaĵoj kaj institucioj (flava flageto); c. Esp-societo aŭ grupoj (ruĝa flageto).
- K. OPINIOJ PRI ESPERANTO: Elektitaj eldiroj pri Esp. de famaj sciencistoj, filozofoj, verkistoj, politikistoj kaj aliaj gravaj personoj.
- L. NACILINGVA LITERATURO PRI ESPERANTO: Verkoj, broŝuroj, studoj pri Esp., publikigitaj en naciaj lingvoj.

La materialo de la ekspozicio estos zorge konservita, por ke ĝi povu esti utiligata en aliaj similaj okazoj.

Materialon por la ekspozicio laŭ la supraj eroj bonvolu sendi rekte al:

Sinjoro Rodolfo García, Calle Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo.

## Por paco kaj Movadoj



### La Tutmonda Pacifista Konferenco en Japanujo

1) Por eltrovi konkretajn rimedojn por la starigo de la monda paco, 2) por firmigi la solidarecon de la pacifistoj de la tutmondo, kaj 3) por defendi la japanan pac-konstitucion, la *Tutmonda Pacifista Konferenco en Japanujo* estis okazigita 1-22 Aprilo, 1954, en la serio de 8 sesioj en Tokio, Fukuoka, Kumamoto, Hiroŝima, Osaka, Nagoja, Sendai kaj refoje en Tokio. La prepara komitato estis organizita per membroj de diversaj religiaj, kulturaj, porpacaj, junulaj kaj virinaj rondoj. La Konferencon partoprenis ĉ. 40 eksterlandaj reprezentantoj el 13 landoj: Aŭstralio, Birmo, Britujo, Cejlono, Francujo, Hindujo, Kambodio, Kanado, Koreujo, Malajo, Meksiko, Usono kaj Vjetnamo.

Konforme al ĝia malofta grand-skala strukturo, multaj gravaj rezolucioj estis faritaj post entuziasmaj interdiskutoj tra la 8 sesioj. Resume oni povus konkludi ke la Konferenco rikoltis sufiĉe

grandan sukceson. Kaj la cirkonstancoj ankaŭ favoris al ĝi, ĉar la lasta Bikini-akcidento kaŭzis al japanoj fortan timon kaj sekve vekigon al paco.

Speciale por esp-istoj estas raportinde ke s-ro Alfred G. Tucker, delegito de UEA kaj kvakero, ĉeestis la Konferencon kiel unu el 3 reprezentantoj el Anglujo. Ĉe la lasta sesio en Tokio (22 de aprilo) li kaj s-ro Sabro Itoo, japana esp-ista pioniro, faris sub ambaŭ nomoj la proponon pri konkreta rimedo por mondskala pac-edukado por geknaboj kiel la baza agado por la mondopaco. Kun la anglalingva interpretado de s-ro Tucker s-ro Itoo klarigis en Esp-o la proponon. Ĉe tio li akcentis la necesecon de internacia korespondado per Esp-o kaj petis fortajn subtenojn kaj kunlaborojn por la Societo de Infanoj en la Mondo, en kies oficejo li nun laboras por organizi tutmondan kolektivan kunlaboron de infanoj por fari kaj eldoni la bonajn librojn de tutmonda vivo (vidu la n-ron 7-8 de OOMOTO, 1953). La propono estis oficiale registrita kiel rekomendinda projekto.

La praktikebleco de Esp-o, kiun s-ro Tucker entuziasme propagandis al reprezentantoj dum la tuta sesio, kaj kiun pruvis la fakto ke li ĉiam estis varme akceptata de japanaj esp-istoj en diversaj urboj, vekis en la tuta reprezentantaro grandan intereson pri Esp-o.

Malferma Soleno de la  
5-a Sesio en Osaka  
(La foto afable donita  
de l' ASAHI-Jurnalejo,  
Osaka)





## Literatura Rubriko

LA INFANOJ DE MILITBAZOJ, kolekto de skribaĵoj de japanaj geknaboj pri la amerikaj militbazoj en Japanujo. El japanlingvo kunlabore tradukis anoj de Kansai Ligo de Esp-Grupo kaj aliaj rondoj: eld. de Japana Esp-a Libro-kooperativo, (Nakacu-hamadoori 2-20, Oojodoku, Osaka, Japanujo); formato: 18 x 13 cm.; 80 paĝoj; prezo: ¥120.

La skribaĵoj konsistas el la kritikoj, malĝoĵoj, indignoj de la geknaboj, kiuj vidas tra siaj senantaŭjuĝaj, purkoraj animokuloj la realon pri la militbazoj. Kion ili skribas?

Estas multaj "problemoj," pri kiuj ili skribas. Japanujo akiris sendependecon en 1952. Sed ĝi estas nur nominala. Estas nun pli ol 700 militbazoj en nia lando. Kio estas tia sendependeco, kia devas submetiĝi antaŭ postulo de aliaj landoj? Spite al la fervora deziro kaj bolanta rezisto, la popolo nun estas ĉiamaniere silentigataj kaj finfine rezignacias al sia mizera sorto. Kaj kiuj estas la politikaj perantoj, kaj jen minacante, jen mensogante, jen delogante, jen konsolante finfine rezignaciigas al siaj samlandanoj, kvazaŭ ili estus mem la reprezentantoj de tiuj aliaj landoj? Neniu alia ol la tiel nomata burokrataro. Ho enigmo, enigmo. El tio tiuj maldolĉaj larmoj de la junaj animoj!

Unu knabino rememoras pri sia frato je la datreveno de lia morto. Antaŭ unu jaro ili kune kun aliaj geknaboj iris al la monto, kie estas la manovrejo de amerikaj soldatoj, por kolekti malplenajn erojn de kugloj por gajni monon necesan por lerneja ekskurso. La frato trovas

ion kun la formo de pafilo kaj levas ĝin super sia kapo kun ekkrio de ĝojo. Trovante ŝnureton li tiras ĝin. Jen, da, da, da, da... La frato kaj unu alia knabino jam ne estas en tiu ĉi mondo. Post unu jaro, hodiaŭ, ŝi kaj ŝiaj amikinoj elfosas rododendron kaj ĝin plantas sur la monto kie ŝia frato mortis. La recenzanto ankaŭ ofertas elkoran preĝon por la paco de lia animo en la transa mondo.

Unu plendas pri la abunda ekzisto de panpanoj\*, "migrantaj birdoj kun ruĝaj lipoj". Ili luas ĉambrojn en ordinaraĵ domoj. Kion ili faras kun amerikaj soldatoj videble? Kian malbonan influon donas tiuj panpanoj al geknaboj sentemaj? Ili jam indignas kontraŭ la panpanoj kiuj oferas sian karnon por mono, kiuj dike ŝmiras siajn vizaĝojn kaj lipojn senhonte, senhonore kaj sen fiero ke ankaŭ ili estas japaninoj. Aliflanke tamen, ili ankaŭ simpatias kelkajn el ili pro ilia plorinda sorto. Unu kazo: la patrino de unu panpano (nun) mortis bombardite; ŝia patro revenis de la milito sen la dekstra kruro kaj tri fingroj de la maldekstra piedo; ŝi devas nutri kaj flegi sian patron. Per ordinara okupo kaj maniero ŝi ne povas vivteni kaj la sola rimedo, kiun ŝi povis elekti, estas la kompatinda sorto. Kion faras la registaro pri tiaj? Ĉe la fino de sia skribo tiu ĉi knabino ekkrias — "Milito, la kruela milito ne okazu ree."

Iu alia skribas, ke benzino enpenetras en la puton ĉar lia domo estas proksima al aerodromo. La akvo ne devas esti trinkata.

\* Post-milita nov-vorto por strat-  
viroj



Ankoraŭ alia skribas ke lia patro laboras por putfosado kaj lia pioĉo trafas ŝtoneton kaj fajreras. La fajrero eksplodigas benzinujon. Li severe vundiĝas. Post dek tagoj da agonio muĝado de doloro el brulvundo, bandaĝita tutan korpon, li finfine mortis.

Estas ankoraŭ multaj, multaj abome-naj, malĝojigaj kaj indignigaj aferoj el la plumoj de geknaboj. Oni mem legu kaj komprenos mem la malĝojon, koleron de la deskribintoj.

Lingvaĵo: ĝenerale bona, sed estas kelkaj ne rekomendindaj punktoj, ekz-  
emple: p. 24, l. 10 — "kio" devas esti "kiu". p. 29, l. 10 de malsupre — "sian edzon" devas esti "sian edzojn". p. 41, l. 13 — "konsilantoj ke ne" devas esti "konsilantoj ke ili ne".

Estas kelkaj mispresoj kaj anstataŭigoj de grandaj literoj per malgrandaj literoj, ankaŭ kelkaj eraroj en interpunkcio.

Ni konsilas al ĉiuj esp-istoj, interes-iĝantaj en paca problemo, ke ili legu tiun ĉi libron kaj kunlaboru por la venko de la konscienco. (Z. Kacura)

**HISTORIO DE S. A. T., 1921-1952**; eld. de Sennacieca Asocio Tutmonda (67, Avenue Gambetta, Parizo 20, Francujo); formato 13 x 20 cm.; 152 paĝoj; prezo: 6.75 skr.

Jam estas ĝenerala kono ke SAT, tutmonda esp-ista asocio, kontribuis kaj kontribuas al la ĝenerala esp-movado per siaj multaj utilaj verkoj. Tamen al mi ŝajnas ke tiuj, kiuj bone scias la precizan sennaciecan karakteron de SAT, estas ne multaj precipe en ekstereŭropaj landoj, kie laboristaj esp-istoj estas tro junaj por havigi al si memstaran organizon. Tiu ĉi verko multe utilos por veki simpatian eĥon en tiu tereno. SAT ja meritas vastan atenton.

En tute objektiva maniero ĝi traktas la dornoplenan 32-jaran vivon de SAT, dividinte en 3 partojn: unua periodo,

1921-1931; dua, 1932-1939; tria, sep. 1939-1952.

La movado de ĉi tiu laboristtendenca asocio bone trabatis al si la vojon spite al diversaj internaj baraktoj, disputoj aŭ foje insidaj atakoj kiuj minacis eĉ la ekziston de l' organizo, ĉiam portante la insistan devizon: "Ni deziras krei sennaciecan popolon. Ni volas senprokraste kutimiĝi al eksternacia pens- sent- kaj agadkapablo." La gvidprincipo de SAT celas sennaciecon sendepandan de la karaktero de la aktualaj reĝimoj. Tamen notinde estas ke ĝi celas batali por la malstarigo de la kapitalista socio kaj batali kontraŭ religio.

Oni povas agnoski ke la evolutendenco de l' mondo celas Unu Mondon. Ĉi-punkte la starpunkto de SAT estas tute prava. Tamen la aktuala evolutendenco, ŝajnas al mi, urĝe bezonas la kreon de mondskala mekanismo, kia estas mondregistaro, ĉar la jama Ligo de Nacioj spertis malsukceson kaj la nuna Unuiĝinta Nacioj ne multe malsimilas konture kun la unua. Kaj la fondo de mondregistaro kondiĉas vastajn subtenojn kaj kunlaborojn de tutmondaj ŝtatoj, ĉiuklasaj popoloj kaj ĉiuspecaj organizoj. Kiamaniere oni efektivigu tian grandiozan mekanismon? La problemo estas malsimpla. Sed mi almenaŭ povas aserti ke ĉiuj homoj, ĉiuj organizoj, ĉiuj ŝtatoj necesas forĵeti rutinajn ideojn kaj sin nutri per indulgemo por teni kompaktan ligitecon al unututeco. En tiu senco mi sincere deziras ke SAT almenaŭ estu bona kunlaboranto por savi la homaron el akuta krizo, kiun akcelas serio da novaj atomarmiloj. Ĝojinde estis ke la unua postmilita SAT-Kongreso akceptis fine de longa debato proponon pri aliĝo de religianoj al SAT.

La verko, Historio de S. A. T., estas leginda. Bela preso sur la bonkvalita papero kun trafikaj ilustroj certe plaĉos al ĉiuj legantoj. (Ŝ. Uemura)

## Parolas la Legantaro

★ S-ro *H. Matubara*, Kisiwada, Japanujo

Pri la frazo, "Estas pli facile por *kamelo* iri tra trueto de kudrilo... kiun prof. Sakae Ikeda menciis en sia verko titolita "Siria Nestorianismo en Japanujo" traktita en la n-ro 1-2 de OOMOTO, 1952, mi sciigas al vi jenajn komentariojn, citante partojn el "*A Catholic Commentary on the Holy Scripture*" (1953, London), kiun mi nun havas en mano.

Laŭ mia konkludo "ŝnuro" ne estas misŝkribo de "kamelo"; la frazo supre dirita do estas tute korekta.

*Mateo XIX 24:*

"Indeed, for merely human reason it is inconceivable that those whose heart is possessed by riches should enter the kingdom. Our Lord expresses this with a slight adaptation of the Jewish proverb (Edersheim 2,342) that 'a man even in his dreams does not see an elephant pass through a needle's eye.'"

*Marko X 25:*

"The paradoxical expression 'a camel passing through the eye of a needle' may have been a proverbial phrase signifying an impossibility. The Talmud has a similar expression — 'an elephant passing through the eye of a needle'.

Laŭ la komentarioj mi supozas ke Jesuo prenis por tiamaĵ judoj pli familieran nomon "kamelo" ol tiun de "elefanto". (La esp-a parto de la letero estas eljapanigita de La Red.)

★ S-ro *Roland Jossinet*, Parizo, Francujo

Mi plezure legas OOMOTO-n, ĉar ĝi elvokas la spiritan vivon de la malproksima lando.

Kiel Katoliko, franco kaj esperantisto,

mi plej sincere respektas viajn opiniojn kaj ĝojas, ke por montri ilin vi uzas nian karan Esp-on.

Aparte plaĉis al mi la artikolo: "El Notlibro Esperantista," kiu predikas por la *pureco* kaj la *simpleco* de Esp. Ho! japanaj samideanoj, helpu, ke ni savu la facilecon de nia komuna Esp-o!

★ S-ro *A. Lagoutte*, Pagoumene, Nova Kaledonio

Vi servas la bonan Kaŭzon, tial ke via Dio estas universala kaj ne diferencigas individuojn kaj landojn. Ĝis hodiaŭ, ĉiuj religioj ~~emas~~ servi ian Dion, kiu almenaŭ laŭ la preĝoj de la servantoj, devus prizorgi kaj protekti plivole ian landon ol alian laŭ la nacieco de la preĝantoj. Mi jam delonge ne volas aŭdi pri tia Dio, kvankam mi estas laŭ bapto Katoliko; mi ne volas servi ian Dion, kiu puŝas al infero la pekulon, kiu eble pekis nur unufojon sed grave, kiu perfidis sian devon al Eklezio, al sia Dio eble nur unu sekundon; tia Dio estus laŭ mi Satano sed ne inda je la nomo Dio. Vera Dio estas senlime bona kaj sekve devas pardoni ĉiujn pekojn, Li mem postulas tion de ni; ke Li igu nin ripari niajn erarojn antaŭ aŭ post la morto, tio estas necesa por ke ni ne eraru en la estonto sed Li ne povas *ne* pardoni, ĉar Li instruadis nin pardoni eĉ malamikon.

Tial mi serĉis ian filozofion, kiu respondus kaj kontentigus miajn demandojn kaj mi trovis dank' al Esp-o rondon, kiu redonis al mi la veran pacon en la koro, nome Rozkruccano Asocion, kiu havas centran oficejon en Kalifornio. Sed ĉar mi vere kredas ke la Vojo al Dio povas esti vidata laŭ diversaj manieroj, mi pensas ke via asocio ankaŭ estas tiel

bona kiel nia, almenaŭ por la medioj al kiuj ĝi estas destinata. Do, karaj samideanoj, la ĉefa afero estas ke Vi kaj Ni servas la saman plenindulgan kaj senlinie bonan Dion kaj ni ĉiuj daŭrigu al plikompleta Kono de la Vero.

★ S-ro *Eusebio Pons Martorell*,  
Barcelona, Hispanujo

Mia korespondanto en Aŭstralio sendis al mi la tutan jarkolekton de OOMOTO. Kiam mi ne havas ion novan por legi, mi elprenas el miaj E-kolektoj tiujn malnovajn de OOMOTO kaj relegas ilin.

En ili mi ĉiam eltrovas allogajn kaj interesajn temojn. Pro tio mi sentas veran ĝojon denove kontaktiĝi kun tiu Orienta filozofio pere de via gazeto. Kiam nun la E-movado reffloras en via lando, aliaj pacemaj homoj en Okcidento ankaŭ laboras pli kaj pli efektive la ideon de d-ro Zamenhof.

Ankaŭ mi sentas grandan admiron por familio Deguĉi, kiuj ĉiam laboris kaj laboras por nia celo, kaj ebligas al esp-istaro tutmonda per siaj artikoloj kompreni kaj enprofundiĝi pri la japana popolo kaj filozofio.

Mi sincere gratulas vin ĉiujn pro via konstanta laboro kaj bondeziras, ke vi rikoltu abundajn esperantajn fruktojn en Oriento.

★ S-ro *Benedicto Silva*, Votuporanga -S.P., Brazilo

Kiel leganto de pluraj esp-aj revuoj, mi tre ĝojas diri al vi, ke via organo estas, el la lingva vidpunkto kiel ankaŭ de la filozofia, unu el la plej legindaj kontribuoj al nia senĉese kreskanta literaturo. La starigon de l' mondpaco OOMOTO klopodas efektive pere de mirindaj instruoj pri frateco, amo kaj komprenemo.

Laŭ la nuntempaj statoj de la aferoj, ĉio klare vidigas, ke spiritualismo estas la forto konsistiganta la potencan "armeon" kiu savos, sen la kutimaj

barbaraj elverŝoj de sango, la de armiloj sin ekstermantajn homojn. Ĉio vidigas, ankaŭ, ke la tria jarmilo estos plena de paco kaj amo. Ĉio tio, tamen, estos ebla nur se niaj kunbatalantoj ne estos blindigitaj de la materialisma influo en la mezo de la kruda batalo survoje al nia sankta celo. Nia venko estas eksterduba.

Materialismo vidiĝas nun antaŭ granda malamiko. Spiritualismo kristana, de l' okcidento, tre identiĝas kun tiu de oriento. Ambaŭ sin bazas sur la saĝaj instruoj de la superaj fratoj de la spaco, kies helpo havas grandan signifon por ni. Kunligitaj, do, de l' samaj sentoj, en batalo kontraŭ la terura materialismo, ni klopodu reunuigi kiel eble plej multe da kunbatalantoj!

La efika Esp-o tre utilas al ni por tio.

★ S-ro *Babel Sørensen*, Farum, Danujo  
Legante malnovan numeron de via tre bonega gazeto, precipe impresis min du strofoj de la verso, kreita de Dua Majstrino Sumiko Deguĉi. Nur multaj vortoj, sed ili esprimas la pensojn de ĉiuj pacemaj kaj prudentaj homoj en la tuta mondo:

*"Se l' tutpovon por milit'  
vi nur uzas por karit'". . .*

Ĉi tiuj vortoj donis al mi la inspiron verki longan poemon, kiun vi trovos en la aparta papero\*\*.

Mi ne konas la Oomoto-movadon, sed ĉar mi komprenas, ke ĝi disvastigas la bonon en la mondo, tial mi nun esprimas mian plej sinceran deziron pri daŭra progreso por vi en tiu grava laboro.

En mia libera tempo mi ŝatas verki poemojn, kaj tial mi ankaŭ ŝatas legi kion aliaj verkis per belaj strofoj.

Ĉiam sub la verda stelo,  
malgraŭ interspaco,  
estu nia certa celo:  
Paco-Paco-Paco-

\* OOMOTO, Dec. 1950

\*\* Vidu la lastan n-ron.

## El Notlibro Esperantista

*Teruo Mikani*

### 1

La Redakcio de OOMOTO transsendis al mi la leteron de d-ro *Adolf Halbedl* (del. de UEA), Knittelfeld, Aŭstrujo. Ĉar ŝajnas al mi, ke ĝia enhavo oferas la temon kaj materialon por pristudo de ĉiuj pensemaj esp-istoj, okcidentaj kaj orientaj, mi ĉi tie publikigas ĝin sen permeso, pro kio mi petas al la skribinto lian afablan pardonon.

Gratulon pro la eminenta enskribaĵo de nia jam malhavebla "Notlibro Esperantista"! Ĝi meritas la plej intensan atenton de ĉiu vera esp-isto kaj disĉiplo de Zamenhof, kiu lasta kreis sian lingvon ne por sciencistoj — ili disponas pri diversaj internaciaj esprimiloj — sed por la vasta homaro, por la amaso de la simpluloj, mutaj sen Esperanto, por ke ili, la plej ampleksa kaj peza tavolo de la socio, fine povu kunfandiĝi je "unu granda rondo familia" kaj rekonstruu la mondon je unu lando kaj patrujo por ĉiuj homoj. Niaj sciencistoj kaj erudiciaj gesamideanoj montriĝis sur la pereigaj vojoj de Ido kaj endanĝerigas la trapenetradon de Esperanto kiel dua kaj sama lingvo de ĉiuklasaj homoj. Pro tio "Scienca Revuo" ankaŭ rifuzis la represon de mia artikolo, kiun poste — la 12. 11. 1953 — mi sendis al vi, esprimante, ke vi orientanoj savu por la homa familio nian komunan lingvon familian. La ĉefaj okcidentanaj esperantistoj tro facilanime kaj senpripense "pliriĉigas" la vortaron de Esperanto per nenecesaj novvortoj, anstataŭ streĉi sian intelekton por la kreado de bezonataj esprimoj el la pure Esperanto-elementoj donitaj. Ekzemple en la artikolo "Nia malsana socio..." de W. P. Roelofs en "SR" de la 1. 11. 1953 ankaŭ svarmas anstataŭigebblaj novvortoj (agnoski = rekonii, konekso = kunest(ec)o, interezo = rentumo, subtraho = depreno, inklude = enferme, amortizo = repag(iĝ)o, transspezofrekvenco de la mono = reuzad(iĝ)o, aktuala = ata, anta, farata, frakcio = onono, disonigo, ekspansio = etendiĝo, plivastig(iĝ)o, pligrand — ktp.

Opinioj povas esti malsamaj pri la "novvortoj" en la supra listo. (Pardonu, la vortoj *aktuala*, *amortizo* kaj *frakcio* jam ĉiuj estas oficialigitaj.) Ĉetere min ne koncernas nun la afero pri SCIENCA REVUO, ĉar mi ĝin ne legas. Sed grava estas la ideo de la skribinto

\* OOMOTO, n-ro 9-12, 1953

ĝenerale kaj mi mem revenos multfoje al tiu ĉi temo en la estonteco.

\*

Profitante ĉi tiun ŝancon, ankaŭ mi notu, ke en la nur unu-kaj-duon-paĝa artikolo, "Enkonduko en la Kulturon!" de s-ro *Francisko Asado*, en THE BRITISH ESPERANTIST, sept./okt., 1953, mi mire rimarkis pli ol dekon da neoficialaj vortoj, el kiuj almenaŭ la jenaj kursivigitaj povas kaj devas esti anstataŭitaj per la vortoj, kiujn mi ekzemple montris inter krampoj.

iel la vero *emanas* (manifestiĝas, elmontriĝas); mondaj *koneksoj* (rilatoj); mi ne *dementis* la ideon (refutis, malkonfirmis); mi donas nur *selekton* el la aktuala librolisto de B. E. A. (eltiraĵojn, ekstraktojn, elekt-aĵojn). Cetere, li skribas, "mi aperas kiel kultura kosmopolito vere statura," sed la vorto *statura* (oficiala!) ne havas la sencon de *de alta statur*o kiel la skribinto intencus havigi. "atingi plenan svingon" estas esprimo, ho, *espangla!* Por esti plene unuecisma, kial li ne skribus "tio estas *nerellev[ant]a afero*" anst. "tio estas senrilata afero"?

Demando: Ĉu la Akademio de Esperanto ne funkcias post la milito?

## 2.

Rilate mian tradukaĵon el la ĉina originalo (vidu la plej lastan paragrafon de mia Notlibro last-numera), nia leganto, s-ro *Wong Ling Kai*, Kowloon, Hong Kong, skribis al mi pere de la redakcio de OOMOTO.

Traleĝinte vian gazeton mi volas sciigi al vi ion, kion mi eltrovis erara el la lasta paragrafo de la parto "El Notlibro Esperantista", t. e.

### *Kajero 7.*

子在齊、聞韶三月、不知肉味……

La originalaĵo devas esti:—

子在齊聞韶、三月不知肉味……

Kiam la Majstro estis en Ĉi, li aŭdis la Ŝaon kaj ne konis la guston de viando por tri monatoj. ...

SED NE:—

Kiam la Majstro estis en Ĉi, li aŭdis la Ŝaon por tri monatoj kaj ne konis la guston de viando. ...

La originala diraĵo pri nia Majstro Konfucio signifas, ke li aŭdinte la Saon (muziko) en Ĉi, li ne konis la guston de viando en la daŭro de tri monatoj. Ĝi efektive ne signifas, ke la Majstro aŭdis la muzikon en la daŭro de tri monatoj kaj ne konis la guston de viando.

Eble la tradukinto miskomprenis la originalan sencion de ĉi tiu diraĵo kaj erare tradukis en japanan lingvon kaj la senco fariĝas grand-diferenca. Ĉu vi bonvolus sciigi al la skribanto de la "El Notlibro Esperantista" pri la afero?

Koran dankon pro la afabla atentigo! Kvankam en la lasta numero mi ne notis speciale, mi elĉerpis, por mia teksto, la ĉinajn kaj la akompanantajn japanajn vortojn el 論語 ("Rongo"), unu el la Iŭanami-serio de Klasikaj Libretoj (諸波文庫) kaj komentita de Joŝio Takeuĉi. En la "Antaŭparolo" de la nomita libro Takeuĉi klarigas interalie\* :

"Kvankam de la unu sama Rongo, ekzistas tamen la tekstoj malsamaj... Estas konate, ke dum la Han-dinastio ekzistis tri apartaj tekstoj: 石論, 神論, 齊論, kaj la maniero de aranĝo pri Kajeroj kaj Ĉapitroj en unu el ili ne ĉiam koincidas kun tiu en la aliaj, kaj ankaŭ ne malmultaj estis la literoj, kiuj sin trovis en unu teksto, kaj tamen forestis en la aliaj kaj reciproke. Ŝajnas, ke de tiu tempo la komentistoj preparis siajn librojn sur la bazo de tiuj tri tekstoj, aŭ akceptante, aŭ forjetante, aŭ intermiksante partojn de ilia enhavo laŭ sia propra opinio. Tial decidi, kiu libro estas la plej aŭtentika, povas ja neniu. Cetere, en la daŭro de pli ol 2,000 jaroj ili estis sennombre multobligitaj, aŭ manskribe, aŭ prese per la manoj de mil kaj mil personoj.

Preterlasoj kaj eraroj dum tia tuta procedo estas neeviteblaj, kaj estas nature, ke la ekzistantaj tekstoj de la Rongo estas diferencaj inter si en diversaj lokoj de ilia enhavo.

Tamen, Takeuĉi asertas samloke, ke ĉiuj Rongo-kopioj, ĉinaj kaj japanaj kiuj ekzistas hodiaŭ, havas sian originon en unu el la du antikvaj tekstoj konataj kiel 開成石經 (ŝtongravurita teksto en Ĉinujo) kaj 清原本 (la plej malnova teksto en Japanujo, mane transskribita el la kopio, kiun enportis antikva japana oficiala sendito al Ĉinujo por studo).

Takeuĉi diras, ke por sia teksto li uzis la lastan, kaj kie okazas "malsamoj" en komparo kun la unua, li faris sian personan elekton kaj tion li montris en la maniero de la akompanantaj

\* Laŭsenca esp-igo mia

japanaj tradukaĵoj. Sekve, ni povas kompreni, ke la du variantoj povas ekzisti:

- A. 子在齊，聞韶三月，不知肉味……  
 B. 子在齊聞韶，三月不知肉味……

La tuta diferenco konsistas nur en la interpunkcio, kiu kaŭzas la malsamajn signifojn.

Mi mem ne estas kompetenta pri ĉina klasikaĵo, nek mi posedas kompetentajn librojn por fari detalan kontrol-komparon pri tiu ĉi punkto. Sed estas ĉemane du facilaj libretoj por ĝenerala publiko, per kiuj mi povas prisupozi la ekziston de du malsamaj sed same fidindaj *fontolibroj* de Rongo, unu el kiuj enhavas la tekston A, kaj la alia la tekston B.

Unu el la libretoj estas “Konfucio” de Ŝigeki Kaizuka, citita jam en la lasta numero. La aŭtoro rakontas la aferon pri la muziko kaj Konfucio citante la tekston A. La alia estas “La Saĝo de Ĉinuĵo” (中國の知慧) kiu eldoniĝis nur antaŭ nelonge. La aŭtoro de tiu ĉi libro, Koojiro Joŝikaŭa, priskribas la saman aferon citante la tekston B. Joŝikaŭa kaj Kaizuka estas la profesoroj de Kioto-Universitato, kiuj ambaŭ estas egale kompetentaj (kiel ŝajnas al mi) aŭtoritatuloj pri ĉinaj klasikaĵoj.

Krome, mi foliumis la paĝojn ankaŭ de “The Four Books” (La Kvar Libroj), kiun mi pruntis de mia amiko - la fama angla tradukaĵo de James Legge, kaj mi trovis ke li tradukis laŭ la teksto B. Sed estas interese noti, ke en la subnoto pri tiu ĉi frazo li komentas①:

Tiu ĉi afero devas esti okazinta en la tridek-sesa jaro<sup>②</sup> de Konfucio, kiam li postiris Dukon Ĉao pro lia forkuro de Lu al Ĉi. Kiel estas skribite en la 史記, “Historiaj Kronikoj,” antaŭ la ideografaĵoj 三月, ni havas 學之, “li lernis ĝin tri monatojn,” kio liberigas nin de la neceseco por etendi la tri monatojn por la tuta tempo, en kiu li ne konis la guston de sia manĝaĵo.

① Elangligo mia

② 517 a.k.

## Redakcia Postskribo

Tri kaj duona jaroj pasis de kiam ni reeldonis la gazeton OOMOTO en novembro, 1950. Dum la tempo feliĉe pli kaj pli kreskis la nombro de niaj abonantoj. Ĝi tamen ankoraŭ ne atingis la celon antaŭe de ni esperitan. Ni deziras kontribui al la tutmonda esp- kaj pac-movado, diskonigante la homaranismajn ideojn de Oomoto-movado kaj U. H. A. kaj diversajn kulturajn aferojn. En tiu senco la gazeto antaŭ ĉio devas esti vaste legata, kaj por tio la enhavo necesas esti pli riĉigata. Ni klopodos fari nian plejebion. Tamen por tio ankaŭ estas alia grava kondiĉo t. e. malalta kotizo. Por faciligi la abonon al la ĝenerala Esperantista publiko, ni malaltigis la abonkotizon ekde la lasta n-ro 1-2. La ĝisnunaj abonintoj rajtas senpage ricevi pluajn numerojn. OOMOTO estu *via* gazeto — la gazeto por ĉiuj homaranoj!

## GAZETOJ RICEVITAJ INTERŜANĜE

(La plej laste ricevitaj n-roj indikitaj)

★ Esperanto (UEA), Feb. ★ Heroldo de Esperanto, n-ro 4 ★ La Praktiko, Jan. ★ The Greater World, No. 1343 ★ Children's Greater World, Jan. ★ Informilo de I. G. E. L., n-ro 1 ★ Sennaciulo, Marto ★ La Migranto, Jan. ★ Setps unto Him, Dec. ★ Dia Regno, Jan./Feb. ★ La Pacdefendanto, Marto ★ La Budha Lumo, n-ro 37/38 ★ La Ĝusta Vojo, Marto ★ Laborista Esp-isto, Feb. ★ Boletín, n-ro 3 ★ Franca Esp-isto, Jan./Feb. ★ La Ĉenero, Feb. ★ The British Esp-ist, Jan./Feb. ★ Dansk Esp-Blad, Marts ★ La Rondo, Jan./Feb. ★ Belga Esp-isto, Feb. ★ American Esp. Magazine, Jan./Feb. ★ L' Aube Nouvelle, Jan./Feb. ★ Frateco, n-ro 1 ★ Neugeist, März ★ Esperanta Finnlando, Dec. ★ Sociedad Uruguay de Esp., No. 8 ★ Nia Stelo, Feb. ★ Novaj Tempoj, Jan. ★ Semu Konstante, Jan./Feb. ★ Svenska Esp. Tidningen, Jan./Feb. ★ La Suda Stelo, Dec. ★ La Moderna Voĉo de Indonesia, Feb. ★ Scienca Ligilo, Dec. ★ Land & Liberty, Jan. ★ Bulteno, No. 10 ★ Drei Eichen Blätter, April ★ Svisa Espero, Feb. ★ Bulteno Gepatra, Marto ★ Espero Katolika, Marto ★ Esperanta Revuo, Nov. ★ Germana Esp-Revuo, Marto ★ Frieden, März ★ L'Essor, n-ro 17 ★ The World Federalists, Jan. ★ The War Resister, No. 64 ★ La Mondpopolo, Jan./Feb. ★ La Revuo Orienta, Aprilo ★ La Movado, n-ro 37 ★ El Japanio, n-ro 26 ★ Junaj Herboj, Marto

### La Abonkotizo de OOMOTO

#### Por eksterlando

Malaltigita per 30 % Jarabono: \$ 0.80 aŭ 12 Steloj

Mendebla ĉe

Internacia Esperanto-Instituto

Den-Haag, Nederlando

OOMOTO N-ro 165--166 (3--14頁) 昭和29年5月1日發行・購読料一年240円

編集人 中村陽宇・京都府亀岡町・株式会社天声社發行・振替京都25757番